Jarkunveno de Grupo Esperantista de Trondheim, 17an de februaro 2009 ĉe Jørgen Åldstedt, Enromv. 160

1. Aprobo de la kunvoko

La kunvoko aprobiĝis.

2. Malfermo de la jarkunveno

Prezidanto de GET, Kjell Heggvold Ullestad, malfermis la jarkunvenon.

3. Aprobo de la tagordo

La jarkunveno aprobis la tagordon.

4. Elekto de kunvena prezidanto, raportanto kaj 2 subskribontoj de la protokolo

Kjell Heggvold Ulestad elektiĝis kiel kunvena prezidanto. Kiel raportanton oni elektis Jardar Eggesbø Abrahamsen. La protokolon subskribos Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

5. Jarraporto 2008

Oni laŭtlegis la jarraporton, faris kelkajn malgrandajn modifojn kaj fine aprobis ĝin.

6. Jarkalkulo 2008

La ĝisnuna kasisto (Ulf Stenhaug) prezentis la jarkalkulon. Oni komentis ke trifoje aperas «Møtekontingent, innsamla av Kjell 5/2». Tio supozeble rilatas al tio ke Kjell *transdonis* tiun monon la 5an de februaro.

GET havas konton en Postbanken kaj konton en Handelsbanken. La jarkunveno taskigis al la elektota kasisto transirigi la plejmulton de la mono el la malpli profita konto al la pli profita konto.

La jarkunveno aprobis la jarkalkulon.

La ĝisnuna kasisto prezentis la budĝeton por 2009. Ĝi estas nur kruda propono, kaj la jarkunveno ne faris decidon pri ĝi.

7. Elektoj

Prezidanto: Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto, sed nova posteno)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (nova)

Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Vicrevizoro: Arne Olav Mjøen (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen Åldstedt (nova) kaj Arne Olav Mjøen (nova)

8. Envenintaj proponoj

Neniu propono envenis.

9. Fermo de la kunveno

La prezidanto de GET fermis la jarkunvenon.

Post la jarkunveno okazis kafklaĉo.
Ĉeestis 9.

Raportis: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Subskribis: Torstein Kvakland Christian Fossen